

## Leterkesto, 1.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1991.06.27 & 30

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia. En nia leterkesto kuŝas multaj korespondaĵoj. Laŭ lia alfabeto ordo de la familiaj nomoj ni peronde respondos al ili. Multaj skribis por diri sian intereson, ĉu koncerne nian elsendaron titolitan "Rendevuoj didaktikaj", ĉu pri nia rakonto pri la formiĝo de la svisa federacio". Ili petis la alsendon de fotokopio de tiuj prelegaroj. Ni perkoresponde kontentigis ĉiujn petintojn. Kaj ni sciigas al niaj radio-aŭskultantoj, ke la revuo "Literatura Foiro" publikigos tiujn prelegarojn sub la formo de artikolaroj kun bildoj.

A.- La Didaktikaj Rendevuoj, kiujn ni prezentis kaj fotokopie dissendis al la petintoj, ne estas la lanĉo de nova instru-metodo. Ili simple kaj senpretende diskonigas novajn ideojn, kiuj povos helpi ĉiujn esperanto-instruantojn. En tiu spirito ni daŭrigos de tempo al tempo tiujn metodikajn elsendojn, ĉar ni konstatis, ke ili vekis tre grandan kaj pozitivan intereson. Ne nur instruantoj interesiĝis, sed ankaŭ esperanto-komencantoj kaj progresantoj, kiuj neniel intencas instrui la lingvon.

Cl.- Ni reciprokas la salutojn de Mario AMADEI en Bolonjo, Italio, kiu skribis:

A.- "Okaze de la 23-a Semajno de Internacia Amikeco, kiun nia Klubo festas ĉi jare per diversaj programoj, mi salutas vin tutkore kaj amike. Gratulojn por viaj interesaj programoj, kiujn mi ofte aŭskultas kaj ankaŭ sonbendigas por prezenti ilin al la klubanoj. Ĝuste hodiaŭ mi prizorgis program-prezentadon pri viaj programoj, kiujn la ĉeestantoj tre ŝatis. Ili kore salutas okaze de Semajno de la Internacia Amikeco.

Cl.- Sekvas 19 subskriboj de la klubanoj en Bolonjo, Italio. Saluton al Arne E. ANDERSSON en Alingsås, Svedio, al Pedro AQUILAR en Logrono, Hispanio, al Hernani ARANJO RESENDE en Lisboa, Portugalio, al K. ARISTARKHOV en Leningrad, Sovetio, kiu sendis ekzercan verkon de sia filo Sergeo ARISTARKHOV pri la temo: "Kiel mi vidas mian landon hodiaŭ". Lian filon vigle frapis la diferenco en la interhomaj rilatoj, kiam li vizitis Litovion dum kvartaga vojaĝo en la pasinta somero. Antaŭ sia vojaĝo li aŭdis diri, ke tie ĝenerale rusojn oni malamas, sed baldaŭ li ekkonsciis, ke tio estas nuraj kalumnioj. Kiel turistoj ili vagadis en diversaj parkoj kaj admiris pri la beleco. Li skribas:

A.- "Mi rimarkis, ke litovoj tutfamilie promenas en parkoj, ĝuas pri la naturo. Homoj konservadas siajn naciajn tradiciojn. Dum tiuj tagoj oni povas ekvidi sur stratoj de urbo virinojn en belaj naciaj roboj. Vendistoj en magazenoj ne arogantas, ne disputas kun aĉetantoj, penadas ĉion aranĝi trankvile, por ke ĉio estu bona. Mi ne rimarkis, ke iu el la vendistoj intencis trompi aĉetantojn, false pesi, ktp."

Cl.- Post sia reveno, tuj post la alteriĝo en la flughaveno de Pulkovo, Sergeo ARISTARKHOV vizitis panvendejon por aĉeti panon kaj bulkon. Starante en vico, li konstatis, ke la bulkoj kostas 25 kopekojn. Tamen ĉe la kaso kasisto "bojinsultis" lin kaj diris, ke li pagu 26 kopekojn. Li skribas:

A.- "Mi trankvile respondis, ke sur la prezilo estas skribite 25 kopekoj, sed nenion krom insultaĵo aŭdis mi en respondo."

Cl.- Tio sentigis al li la diferencon inter la digna sinteno rimarkita en la balta lando Litovio kaj la krutaj insultoj regantaj en lia rusa urbo kaj li esprimas esperojn, kiujn ni legas en multaj leteroj:

A.- "Mi esperas, ke venkos demokratiaj popolfortoĵoj kaj multpartieco. Sed hodiaŭ mi volus alvoki homojn esti pli kulturaj, pli bonkoraj unu al aliaj."

Cl.- La letero finiĝas per priskribo de la nutraj malfacilaĵoj en Sovetio, malfacilaĵoj kaŭzataj ne de malriĉeco propra al la lando, sed al la reganta ekonomia sistemo. Ke lernanto verkas ion tian por prezento en la lernejo, tio montras tute certe grandan evoluon en Sovetio. Antaŭ kelkaj jaroj tia raporto estus signinta baldaŭajn malagrablecojn por la verkinto. Tial neniu kuraĝis verki ion tian, dum nun la junularo eklernas esprimi proprajn vidpunktojn.

A.- Saluton al Zenon BARTOCHA en Rybnik, Pollando, al Norman BERDIĈEVSKY en Zikhron Yakov, Israelo, kiu proponas rond-tabl-diskutojn pri debat-elvokaj temoj, kiel ekzemple la libro "La Bona Lingvo" de Claude PIRON.

Cl.- En la aŭtuno ni havos la okazon diskuti pri tiu libro kaj pri la recenza respondo de Rikardo ŜULCO titolita: "PIRONO Klaŭdo kaj la malbona lingvo". Al niaj geaŭdantoj ni konsilas antaŭan legadon de ambaŭ verketoj tre signifaj pri du kontraŭaj vidpunktoj prilingvaj, kiuj karakterizas la hodiaŭan sintenon al Esperanto.

A.- Jozef Pawel BIELINSKI en Bydgoszcz, Pollando, faras demandon: "En la programo estas kvaronhoro rezervita al Esperanto, sed vi parolas nur dek minutojn. Kial?"

Cl.- Ni simple respondu, ke por niaj prelegoj ni ricevis po dek minutojn, kaj ke la muziko, kiu ĝenerale sekvas niajn elsendojn, havas tute certe rolon gravan, ĉar niaj elsendoj troviĝas inter elsend-unuoj, kiuj povas kelkfoje malakurati. Simile, kiam oni vojaĝas trajne, oni sin demandas foje, kial trajno longe haltas en kelkaj stacidomoj. La ĝenerala kaŭzo estas la antaŭvido ĉiam ebla pri neceso reakuratiĝi okaze de perturbita horaro. De tempo al tempo niaj elsendoj daŭras iom pli ol la dek minutoj je dispono, sed ĉiam kun la risko, ke okaze de programa malakuratiĝo, la fino de la koncerna prelego ne povos esti disaŭdigata.

A.- Ni dankas al Luis BLASCO en Zaragoza, Hispanio, pro liaj kvar mesaĝoj, kiuj montras, ke li ofte aŭskultas nin en la montara ŝtato Andoro, al Gumar BORGERSSON en Malmö, Svedio, al Grete BREUNLICH en Vieno, Aŭstrio, al Marco Merino BUJÁN en Santander, Hispanio, al Dorota BUJNOWSKA en Olecko, Pollando, kiu hazarde trovis nian radion sur la ondoj, al Jean CALAMY en Aubagne, Francio, kiu skribis koncerne nian laŭtleĝon de novelo de Julio BAGHY:

Cl.- "La pasintan sabaton mi aŭdis belan teatraĵeton de Julio BAGHY pere de la voĉoj de gesinjoroj GACOND. De ok jaroj mi aŭskultas Svisan Radio Internacian kaj neniam mi povintus suspekti la talenton de la radioparolanta paro, kiu profesinivele redonis perfekte la gajan kaj petoleman tekston de la fama verkisto."

A.- Tiu pozitiva kritiko kuraĝigas nin plue laŭtleĝi de tempo al tempo aliajn beletraĵojn.

Cl.- Saluton al Pierre LE CALVEZ en Plérin, Francio, kiu skribis:

A.- "Ni formis grupon de ĉirkaŭ dek kvin esperantistoj, kiuj kunvenas ĉiumonate en la urbo Saint-Brieuc (Bretonio); unu el ni surbendigas viajn elsendojn kaj ni aŭdas aŭ reaŭdas ilin

dum la kunvenoj. Tio estas bona bazo de diskuto kaj tiel ni fariĝas pli lertaj en parolado kaj aŭdado de Esperanto."

A.- Ni remalfermos nian leterkeston la venontan semajnon kaj konkludas per saluto al Jorge CASTELLANOS en La Habana, Kubo.

Cl.- Nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND diras al ĉiuj :  
Ĝis la reaŭdo!

---

*Kopirajto © Claude GACOND, [www.esperanto-gacond.ch](http://www.esperanto-gacond.ch)  
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*